

# la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia  
Aŭtuno de 1989. N-ro 16-a. Jarkolekto 4-a

0,75 \$



## Karitataj kvitancoj



Post kelkara strebado, la Esperanto-Societo Kebekia finfine akiris de la kanada kaj de la kebekia registaroj la rajton doni al la mondonacintoj kvitancojn, kiuj ebligas malaltigon de la pagota imposto. Ni agnoskiĝis kiel karitata organizo, kun la numero 0816116-

29. Kaj tiu rajto jam validas de kelkaj monatoj. Sekve, la oficejo de E.S.K. baldaŭ eksendos tiajn triekzemplerajn kaj dulingvajn (E-e kaj france) kvitancojn al ĉiuj donacintoj de dek dolaroj aŭ pli kaj kiuj petos kvitancon.. **Donacu malavare !** □

## Reçu pour fins d'impôt

Depuis déjà quelques années, la Société québécoise d'espéranto effectue des démarches pour être reconnue **œuvre de charité**, dans le but d'avoir le droit d'émettre des reçus pour fins d'impôt à nos donateurs. C'est enfin chose faite: il a fallu modifier légèrement les buts inscrits dans nos règlements généraux. Notre nouveau statut, attesté par le numéro 0816116-

29, est même rétroactif de quelques mois. Le temps de s'organiser un peu, et le bureau de la S.Q.E. émettra bientôt des reçus, en trois exemplaires et bilingues (espéranto et français) à toute personne qui fait un don de dix dollars ou plus à la S.Q.E. et qui en fera la demande. **Donnez généreusement.** □

## Anonceto

Membro-amiko de la Esperanto-Societo Kebekia serĉas esperantiston, kiu dezirus lupreni loĝambron, en Outremont. Interesatoj sin turnu al Hans Bongers, (514) 276-9246. □

## Forgeso

En la kolofono de la pasinta *Riverego*, estis bedaŭrinde forgesite menci la kontribuon de Martin Lavallée. Pardonon. □

## Telefono

La Esperanto-Societo Kebekia finfine havas propran telefonnumeron : (514) 272-0151. Troviĝas ĉe la telefono konstanta respondilo. Interesitoj sekve povos trovi nin multe pli facile. □



## Téléphone

La Société québécoise d'espéranto dispose finalement d'un numéro de téléphone bien à elle: (514) 272-0151. Un répondeur est en fonction jour et nuit. On pourra donc contacter la S.Q.E. beaucoup plus facilement. □

# *la Riverego*

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 300.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Victor Epp, Normand Fleury, Claude Lebuis Patrice Mongeau kaj Cyrille Robidoux.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,75 \$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero : 1-a de decembro de 1989.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia  
C.P. 126, succ. « Beaubien »  
Montréal, Québec  
KANADO H2G 3C8

telefono: (514) 272-0151

---

# La ĝenerala kunsido

---

Sabaton 26-an de aŭgusto, okazis en Montrealo malgranda ĝenerala kunsido, kiun ĉeestis entute naŭ homoj. Ĉu la estraro devos rememorigi la membrojn pri tiu

grava evento en la Asocia vivo? La plej grava parto de la kunsido estis la raportoj de la estraranoj. Vi trovos ĉi-sube resumon de ili.

## Prezidantaj vortoj

Mi unue volas danki la personojn, kiuj helpis la asocion dum la pasinta jaro. Sen viaj agoj, nia Societo simple ne povus progresi.

1987 estis agadplena jaro. Reklamado pri Esperanto okazis diversloke, diversmaniere kaj eĉ grandskale.

1988 estis jaro de sufiĉa kresko. Ni atingis 200 membrojn. *La Riverego* fariĝis pli informa kaj belaspekta.

1989 estis jaro ne plene kontentiga ĝis nun. Ni perdis ĉirkaŭ 70 membrojn. Kaj eĉ kelkaj lertaj Esperantistoj ne realiĝis malgraŭ skriba peto tion fari.

La printempa renkontiĝo en Ĉarlevezio allogis tro malmultajn personojn se oni taksas la antaŭpreparlaboron necesan. La loko, la regiono, la programo, la etoso estis bonaj. Nur mankis pli amasa partopreno.

*La Riverego* estas la nura regula faraĵo de E.S.K. Ni konscias, ke estas loko por plibonigoj kaj strebas al tio. Danke al la franclingva enhavo, *La Riverego* estas aĉetebla en du librovendejoj en Montrealo (*Zone libre* kaj *Boule de neige*).

Por plibonigi la asocion, laŭ mi, necesus ke la membroj transprenus pli da respondecoj. Nuntempe, la estraranoj okupiĝas pri la renkontiĝoj, la bulteno, la reklamado, fakte preskaŭ pri ĉio. Nur malmultaj membroj agadas kvazaŭ ili fidus, ke la estraro povas aŭ devas ĉion fari.

Ekzemple, se kelkaj membroj transprenus la organizadon de la provincaj renkontiĝoj, tio ebligus la estraranojn dediĉi sin al aliaj agadoj.

La invito kunlabori ŝvebas en la aero: estas al vi flari ĝin!

Movade salutas,

*Normand Fleury*

## Pri la financoj

Dum la lasta societa jaro, E.S.K. faris ŝajne grandan profiton je 777,70 \$; oni devas ĝin nuancigi, sciante, ke E.S.K. devas elspezi la 500 \$, kiujn ĝi ricevis de K.E.A. por la tasko informadi pri Esperanto tra Kebekio. Aliaj gravaj ciferoj: la kotizoj restis stabilaj je 876 \$ kaj donacoj je 171 \$; la profito pro renkontigoj falis de 230 \$ (en tio plej gravis la Maskuta renkontigo) al 23 \$; la tuta enspezo sumis preskaŭ 1700 \$. La plej granda elspezo estas *la Riverego*, kun 570 \$; la sumaj elspezoj altas je ĉ. 900 \$. La financoj bone fartas; ŝajnas, ke nur mankas homfortoj por taŭge elspezi nian monon.

Tamen, ĉefe ĉar la informada laboro pli kaj pli kreskas, la estraro decidis altigi la venontjaran kotizon por ordinaraj membroj al ok dolaroj.

## Membraro

Fine de 1988 okazis granda forfalo de membroj, kiujn ni ne povis reakiri, eĉ sendante leteron al

ili. Estas kompreneble, ke multaj Amikoj, post unujara membriĝo, foriras. Sed eĉ perdis kelkaj ordinaraj membroj. Sekve, komence de junio de 1989, tia aspektis la membraro:

Ordinaraj membroj: 51 (75)  
Sam-adresaj membroj: 9

Favor-kotizaj membroj: 14

Dumviva membro: 1

Amikoj: 62 (63)  
Samadresa Amiko: 1

## Persona komento de la sekretario-kasisto

Laŭ mi, la ĉefa problemo de E.S.K. estas la manko de homfortoj, ĉefe de homoj, kiuj pretas taŭge preni responsojn. Tre malmultaj homoj sentas sin responsaj pri la Societo kaj la Kebekia movado, kaj apenaŭ pli pretas kunhelpi. Tamen, se ni estus pli multaj, la rezultoj certe estus multe pli grandaj, ĉar jam la fundamentoj estas metitaj. □

---

## Aliĝilo al la Kanada Esperanto-Asocio

La membroj de la Esperanto-Societo Kebekia povas membriĝi en la Kanada Esperanto-Asocio kontraŭ malalta kotizo, se ilia kotizo atingas la oficejon ĝis la fino de februaro 1990-a. La kotizo por unu jaro (ne ekzistas plur-jaraj kotizoj) estas 12 \$ por ĉiu homo. (Individua kotizo kostas 24 \$-ojn.) Pro la nuna fiaosa kasa situacio de K.E.A., E.S.K. neniel garantias pri la sekvo de via aliĝo. Skribu vian ĉekon alnome de Esperanto-Societo Kebekia.

Nomoj de aliĝantoj: \_\_\_\_\_

---

---

## La papago

de Patriko Monjo

---

La plej ofta esperanta gazeto naskiĝos la 2an de oktobro ĉi-jare. Ĝin eldonos ĉiutage Patriko Monjo el Montrealo. Ĝi estos ankaŭ la plej moderna esperanta gazeto, ĉar ĝi estos telefona anstataŭ papera. Ĝi nomiĝos *La papago*, ĉar iu ajn povos telefoni kaj diri artikolon, kiu aperos la morgaŭon, kvazaŭ ripetata de papago.



Kiel aŭskulti *La papagon*? Vi simple telefonu ĝin. Ĝia numero estas (514) 270-0054. Tiu numero estas facile memorebla, ĉar duoble 27 estas 54! Atendu paciencoj, telefonrespondilo respondos, kaj laŭtlegos por vi la gazeton. Aŭskultu. Kiam ĝi estos finita, bonvolu diri aŭ vian nomon, aŭ kaŝnomon, kaj la urbon de kie

vi telefonas. Tiel eblos taksu la aŭskultantaron. Laŭvole, vi fine povos diri artikolon por la morgaŭa eldono, aŭ komentojn al la eldonisto.

Kial ĉiutaga esperanta telefona privata gazeto? Ĉar Patriko volas eksperimenti. Li esperas interalie vigligi la movadon, provizi okazon aŭdi esperanton, oftigi la uzon de esperanto kaj provizi okazon al ĉiu paroli kaj esti aŭskultata (almenaŭ de la respondilo!). Li intencas paroli mallonge, sed pri multaj temoj. Eble estos rubrikoj laŭ la tagoj, kiel *por komencantoj*, *debato pri aktuala temo*, *prilingva rimarko*, *movadaj informoj*, kaj tiel plu. Ĝi estos foje amuza, foje serioza, foje tia, kia ĝin volos tiuj, kiuj kuraĝos kontribui.

Ekde oktobro, ne forgesu aŭskulti senpage *La papago*! Bedaŭrinde devos pagi la telefonkoston tiuj, kiuj loĝas malproksime. Kiam *La papago* estos fama, eble ĝi ricevos subvenciojn aŭ monajn kontribuojn kaj havos 800-an telefonnumeron! □

---

Kiel oni povos rekoni Esperanto-Akademianojn post la nuklea milito?  
*Ili estos tiuj, kiuj diskutos, ĉu la katastrofon kaŭzis eraro de komputilo aŭ de komputero.*

Kiel oni povos rekoni Esperantistojn post la sama milito?  
*Ili estos tiuj, kiuj diskutos, ĉu la katastrofo kaŭzis eraro.*

Norberto Saletti

---

## Klaĉaj novaĵoj

de Patriko Monĵo

---

Kvar Kebekprovincanoj iris al la internacia junulara kongreso ĉi-somere.

El tiuj, unu ne sukcesis atingi la lokon. Temas pri Silko, kiun nia registaro sukcesis firmiti, allogante lin per senlaborecaj pagpromesoj.

La dua, komprenante la movadon laŭ la ekzemplo de nia samlandano Paul Hopkins, tuj sukcesis trovi belan Polinon. Pri la kongreso, li scias nur la belecon de la partoprenintinoj. De lia reveno ĉi-tien, li sopiras nur la alvenon de sia amatino. Ĉiuj rekonis Reĝon.

La tria ne estas homo, sed ŝarko. Post la IJK, li iris al la UK, kie anstataŭ partopreni, li precipe sin banis en la maro. Temas pri Silvano, pri kies ŝarkecon informis Cyrille.

La kvaran ni ne bone konas. Temas pri iama ĉitieano, nun loĝanta en Svislando. Cetere ne

estas facile rekoni lin kote vestita. Por pli da detaloj, informiĝu ĉe lia kuzo en Kebekurbo.



Iris ankaŭ alia Kanadano: Yves Bellefeuille. Antaŭ ses jaroj, li estis estrarano de TEJO. De ses jaroj li ne movadis. Nun oni elektis lin vicprezidanto de TEJO. Kia surprizo. Por ĉiuj, sed ankaŭ por li!

Kiuj ĉeestis la printempan ESKan renkontiĝon, tiuj eble memoras la ĵongliston, kiu prezentis por nia amuzo spektaklon. Atentu, ke la malsano ne vin atingu. Kelkajn simptomojn iuj jam observis ĉe dua esperantisto, kiu baraktis kontraŭ tri pilkoj. □



## Nouvelles internationales

par Cyrille Robidoux

---

### L'espéranto dans le métro

Depuis plusieurs années, à Paris, la R.A.T.P. fait sa réclame avec des affiches sur lesquelles un texte en de nombreuses langues dont l'espéranto. À Kiev, les activités du Cercle Artistique Espérantiste (KARE) ont lieu dans

la Maison de la Culture du métro de la capitale ukrainienne. Ses membres souhaitent établir des relations avec des espérantistes travaillant dans le métro de diverses villes du monde.

(SAT-Amikaro, juillet-août 1989)

---

## Renkontiĝo en Otavio      Rencontre à Ottawa/Hull


---

Eskapu la aŭtunan grizaĵon partoprenante la amikplenan renkontiĝon de E.S.K./O.E.A. ( Ontario Esperanto-Asocio ) dum la dankfesta semajnfino

**Kiam** : 1989.10.7-9

**Kie** : Ĉe la Centro Jacques Purcell, 300, allée Jacques Purcell, angule de Lewis kaj de Elgin. Ni dormos en la « YMCA » en Otavio, tute apude.

Oubliez la grisaille automnale en participant à la rencontre amicale de la Société québécoise d'espéranto et de l'Association ontarienne d'espéranto durant la fin de semaine de l'Action de Grâce. Nous vous invitons au Centre Jacques Purcell, 300, allée Jacques Purcell, au coin des rues Lewis et Elgin, du samedi 7 au lundi 9 octobre 1989. Nous dormirons au YMCA d'Ottawa, situé tout près.



## Proponita temo

**Ĉu esperanto estas taŭga intergenta komunikilo en Kekekio kaj Ontario ?  
Manĝelo Kampanjaĵa gvidos la diskuton.**

## Jen la alloga programo por vi !

### Sabate

- « Posttagmeze : alveno, libera babilado, ĵurnalintervjuoj. Kurso por komencantoj ; por lertuloj, kurso pri « Kiel partopreni kunsidon »
- Vespere : Surlokaj kulturaĵoj. Ne forgesu perpari ion !

### Dimanĉe

- Matene : Vizito de la Belarta Muzeo.
- Posttagmeze : Vizito de la Muzeo pri Civilizacioj
- Vespermanĝo en la urbo.

### Lunde

- Matene : Debato por la lertuloj kaj kurso por la komencantoj.
- Posttagmeze : Ludoj, babilado, libera programo.

En la Centre Jacques Purcell troviĝas naĝbaseno : kunportu bankostumon. Eblas kuiri en la Centro, escepte dimanĉon por la mateno kaj la tagmezo : ni tiam estos for en la urbo vizitante muzeon. Tamen, en la YMCA estas memserva restoracio.

L'arrivée a lieu le samedi, durant l'après-midi. Dimanche, nous nous baladerons en ville, visiterons deux musées (Beaux-Arts et Civilisations) à Ottawa et à Hull, et souperons en ville. Lundi, jour de l'Action de Grâce, nous serons de retour au Centre Purcell. Un cours pour débutants aura lieu ce matin-là. Mais le fait de passer trois jours dans un milieu espérantiste a en soi une valeur pédagogique.

Les rencontres espérantistes vous permettent de vivre un bain d'espéranto. L'ambiance y est amicale et des cours sont offerts lorsque le nombre de participants le justifie. Le Centre Jacques Purcell est équipé d'une piscine. N'oubliez pas votre costume de bain. On peut faire la cuisine au Centre, sauf pour le déjeuner et le dîner du dimanche, journée pendant laquelle nous visiterons des musées. Mais sachez que le YMCA offre une cafétéria.



## Kotizo/Frais d'inscription

La kotizo inkluzivas nek la manĝojn nek la vizitojn. La manĝojn vi povos mem pretigi en la Centro Jacques Purcell. Tamen zorgu, ke dimanĉe, ni estos ekster la centron. Vi povas fotkopii la aliĝilon laubezone.

Les frais d'inscription ne comprennent pas les repas ni les visites. Vous pourrez préparer vos repas au Centre Jacques Purcell. Tenez compte du fait que nous n'irons pas au Centre le dimanche. Vous pouvez photocopier le formulaire d'adhésion au besoin.

### Kalkulu vian kotizon :

Ĉiu partoprenanto plenum(ig)u sian propran aliĝilon.

Chaque participant doit compléter un formulaire d'inscription.

Baza kotizo	20 \$	Frais d'inscription
ESK/OEA-anoj, substrahu 4 \$	—	Les membres de la SQE/OEA peuvent déduire 4 \$
Favorkotizuloj*, substrahu 4 \$	—	Cotisation spéciale*, déduire 4 \$
Via kotizo estas :	—	est la montant de votre cotisation.

\*Malavantaĝulo aŭ enspezinto de malpli ol nete 800 \$ lastmonate.

\*Handicapé, ou personne à faible revenu : moins de 800\$ net par mois.

Se vi volas helpi nin sed ne povos partopreni, tiam aliĝu kiel morala aliĝanto, pagante 10 \$.

Vous pouvez nous aider par une cotisation de soutien sans participer à la rencontre : 10\$

Mi morale aliĝas. Je verse la cotisation de soutien.

**Tranoktado****YMCA Ottawa****Hébergement**

La baza dunokta kosto por tranokti ĉe «Y» estas 81 \$ por tuta trilita ĉambro./L'hébergement au «Y» coûte pour deux nuitées 81\$ pour une chambre à 3 lits.

Mi deziras.../J'aimerais...

Tranokti sole pkaj pagi/Etre seul et payer	81,00 \$	<input type="checkbox"/>
Trankokti kun unu alia persono/Partager la chambre avec une personne	40,50 \$	<input type="checkbox"/>
Tranokti kun du aliaj personoj/Partager la chambre avec 2 personnes	27,00 \$	<input type="checkbox"/>

La infanoj sub 12 jaroj partoprenas senpage kondiĉe ke ili ne okupos liton.  
Les enfants de moins de 12 ans ne paient rien, à condition de ne pas occuper de lit.

Nomoj : \_\_\_\_\_

Komentoj : \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ \$ + \_\_\_\_\_ \$ = \_\_\_\_\_ \$  
aligo/inscription                      tranoktado/hébergement                      enmetita/total inclus

Ni devas mendi la ĉambrojn ĝis la fino de septembro. Tio signifas, ke vi **NEPRE** aliĝu ĝis la 29-a de septembro. Por plirapidigi la aferon, ni proponas, ke vi ĝiru la monon per Inter-Caisse ( Caisse populaire de Saint-Paul de la Croix : 815-30166, Société québécoise d'espéranto : 25159 ), kaj telefonu vian aliĝon al (514) 272-0151. Ni pardonpetas pro tia hasto.

Nous devons payer les chambres avant la fin de septembre. Il est donc **INDISPENSABLE**, que les inscriptions et les paiements nous arrivent avant le 29 septembre. Pour accélérer les choses, nous vous proposons de payer par Inter-Caisse, à la Caisse populaire de Saint-Paul de la Croix (815-30166), compte de la Société québécoise d'espéranto (25159). Informez-nous par téléphone de votre inscription, en composant le (514) 272-0151. Nous vous demandons pardon pour cette hâte.

## Amnistie internationale et l'espéranto

Amnistie Internationale, qui travaille au niveau international pour la libération des prisonniers injustement incarcérés, a reçu, à l'occasion d'une pétition à l'échelle mondiale sur le thème «Les droits de l'Homme immédiatement», de nombreuses lettres en espéranto. Toutes les lettres reçues de Chine venaient d'espérantistes.

(Monato, juin 1989)



## Glasnost, amour et espéranto

Un nouveau service vient d'être fondé en Union Soviétique sous le nom de *Geesperantista Servo Geedziĝa*, dans le but de favoriser les mariages entre espérantophones de divers pays. Le formulaire à remplir peut être reçu contre deux coupons-réponses internationaux. Il suffit de le compléter en y joignant trois photos; les hommes doivent ajouter dix coupons-réponses internationaux (c'est gratuit pour les femmes):

GSG Fotoklubo  
Kesto 175 Postamt  
SU-220050 MINSK  
U.R.S.S.

(SAT-Amikaro, juillet-août 1989)

## Langues minoritaires

Dans les pays membres de la Communauté économique européenne, on trouve 321 millions d'habitants et la CEE utilise neuf langues de travail. Mais il y a, dans la CEE, de 40 à 50 millions d'autochtones européens dont la langue maternelle n'est pas une langue officielle du pays dans lequel ils habitent. Le seul pays membre de la CEE dont les habitants ne parlent qu'une seule langue est le Portugal. En tout, plus de 30 langues n'ont aucun statut ou un statut de langues régionales ou communales. En France on parle sept de ces langues et en Italie, douze. Les peuples parlant ces langues peuvent être divisés en quatre catégories:

- 1) Les peuples dont la langue nationale n'est pas une langue de travail de la CEE (par exemple: les Irlandais et les Luxembourgeois).
- 2) Les peuples n'ayant pas d'État indépendant, et qui vivent dans un pays dont la langue officielle n'est pas la leur (les Gallois, les Bretons, les Frioulans, les Frisons).
- 3) Les peuples ayant les mêmes coordonnées que la catégorie 2, mais qui vivent dans plus d'un pays de la CEE (les Catalans, les Occitans, les Basques).
- 4) Les peuples dont la langue est officielle dans un autre pays, mais pas dans le pays où ils habitent (Allemands en Belgique, Français en Italie).

Le Traité de la CEE en aucun moment ne fait allusion aux langues les moins utilisées. Mais en 1979, un groupe de parlementaires, à l'initiative de l'Irlandais John Hume, proposa au parlement européen qu'il garantisse certains droits aux locuteurs de langues minoritaires, principalement en matière d'éducation, de communication et de publication administrative.

La recommandation fut acceptée le 16 octobre 1981 par une grande majorité; la CEE reconnut ces langues comme faisant partie de l'héritage européen et elles devraient donc ainsi être conservées.

Mais en pratique, la réalité risque bien d'être différente, car si l'on se fie à la tendance actuelle, la majorité des Européens seraient en faveur de l'anglais comme langue officielle de la CEE, et on recommanderait l'apprentissage d'une autre langue officielle de la CEE, en plus de la langue officielle du pays dans lequel on vit. Ce qui ferait pour les locuteurs de langues régionales, quatre langues à apprendre. Cela demanderait un effort intellectuel considérable pour ces gens et c'est même une démarche impossible pour certains.

(Esperanto, juillet-août 1989) □

---

## Babelaj trompoj

de Victor Epp

Okazas, ke ekzistas la sama sono aŭ eĉ la sama sinsekvo de sonoj en du lingvoj. Mi citas kelkajn ekzemplojn. En la itala oni diras /t/ (aŭ /t/) por signifi *tie* aŭ *tien*. En la araba, tiu sono signifas *ne*.

Foje itala amiko kaj mi vizitis Ĝedon en Saŭda Arabio por aferoj kaj loĝis en hotelo ĉe unu flanko de tiu urbo. Devinte iri al alia flanko de la urbo, ni serĉis taksion. Ni antaŭe petis al arablingvano skribi la celatan adreson sur peceton de papero. Trovinte taksion, ni montris al la taksiisto la adreson, sed li nur kapneis. Li ne kapablis legi. Ekis problemo. Do ni devis indiki al li la stratojn. Ne



ekzistis komuniko inter ni, ĉar li ne nur ne scipovis legi, li ankaŭ ne scipovis la anglan sen paroli pri la itala, kaj ni ne scipovis la araban. Do tiel ni estis reduktitaj al nuraj fingraj indikoj.

Bone, oni ekvojaĝis. Ni montris al li la unuan straton kaj poste la angulon kaj kien turni. Laŭ nia irvojo ni devis pasi trafikcirklon en kiun venas kaj el kiu iras kvar aŭ kvin stratoj. Estis ankaŭ ponto treege trafikata. Ni eniris ĝin kaj, ne antaŭvidite de mi, mia itala kunulo subite laŭtvoĉe diris: /t/ /t/ indikante straton per fingro. Kion li volis diri estis ja *tien*, sed kion la taksiisto komprenis estas

ja *ne*. Do li tuj forte bremsis. Feliĉe neniuj sekvanca aŭto koliziis kun la nia!

Aliaj ekzemploj venas el la napola idiomo. Tie *nu salam' apiz'* signifas *kolbaso, kiu pendas*. En la franca, tiu sinsekvo de sonoj

signifas *ni iris al Pizo*, urbo fama pro ties klina turo. Alia ekzemplo, estas *ĝitaj a not*, kie al napolano signifas *nokttempa ĉagreno*, sed al anglo similas multe al *why not*, kiu signifas *kial ne*. □

---

## Helpu al Jan Marek Kopytek

de Normando Fleury

---

Vi verŝajne rimarkis, ke la Esperanto-movado en Kebekio kaj ĉefe en Montrealo pligrandiĝas kun la alveno de enmigrintoj, kiuj scipovas paroli esperante. Dank'al ili, nia movado pliriĉiĝas kulture. Kiam kunvenas personoj el diversaj devenoj, la uzo de la internacia lingvo fariĝas tute necesa. La novaj esperantistoj estas kuragiĝistoj ĉar tiuj vidas la utilon scii esperanton kaj jam povas sperti la internaciecon de la movado.

Jan Marek (Johan-Marko) estas juna Polo, rifuĝinto nuntempe loĝanta en F.R.Germanio. Li ne volas reiri Pollandon pro diversaj kialoj kaj Germanio ne povas doni al li restad-permeson pro troa nombro da datire alvenantaj

rifuĝpetantoj. Li estas lerta esperantisto kaj profesie elektroteknikisto.

La estraro de E.S.K. jesis al mia propono, ke oni garantiu lin dum unu jaro. La Kanada Ministerio pri Enmigrado jam akceptis nian peton kaj ni esperas, ke li alvenos en la venontaj monatoj.

La Ministerio postulas altan garantian sumon por unu jaro. Ni do alvokas donacoj de la membraro. Memoru, ke nia Societo estas karitata organizo: vi ricevos impost-kvitancojn.

Mi sincere kredas, ke Jan Marek dediĉos multajn horojn por helpi nian Societon post lia alveno.

Mi sincere antaŭdankas ĉiujn. □

---

Pour améliorer votre connaissance de la langue espéranto, rien de tel que de participer aux rencontres, internationales ou nationales. Les premières sont évidemment les plus efficaces: en plus d'un effet purement pédagogique, elles permettent de nouer de nombreuses amitiés partout au monde et de ressentir cette communauté mondiale dont les espérantistes parlent si souvent. Une fois que l'on a des ami-e-s un dans de nombreux pays, plus question de quitter le mouvement, sous peine de ne plus les revoir.

---

## Sala silko

---

de Hélène Blais

Tuto de la rigardo  
sur tiuj lipoj  
sur tiuj vortoj

tuta haŭto tuŝetas  
la tekston  
tiu flukontura koro de balen'

signoj vadas  
en la memoro de l' korpoj

diaj persistadoj  
de amo-akvoj  
kie surmare fuĝi

tuta ebla ludo de ektagiĝoj  
deturnas duetojn  
hazardojn

tuta soifo  
tuta malsato  
eksaltas pro insignoj

ĉiuj iliaj buŝoj sin ellasas  
karmezinaj sorĉolibroj  
donas redonas  
pardonas fordonas sin  
ĵetas formon de siaj sonoj  
sur tutan enakvigitan solecon  
de laboremaj celacinoj

amataj amikinoj  
ili loĝas  
marajn parolojn deportitajn  
laŭ volo de ventoj  
laŭ volo de mestizitaj  
tajdoj

pintas ĉe horizonto de virinoj  
tuloj el sala silko  
glutitaj roboj kiuj pulsas  
en vasteco de ondoj

Tradukis Claude Lebuis

---

# Montreala paĝo

de Sylvain Quirion

---

## Invito al montpromenado

Jam venas la aŭtuno, kaj kun ĝi la buntaj arbaroj. Jen aparte bona tempo por observi la naturon. Pro tio, mi proponas al ĉiuj montpromenadon ( verŝajne al la monto Saint-Hilaire ). Ne sciante kia la vetero tiam estos, mi ne volas nun fiksi daton. Sed ĉiuj interesatoj povas komuniki al mi siajn eblecojn. Ni elektos kune taŭgan tempon por ĉiuj el ni, kaj por la suno ankaŭ. La veturado ankoraŭ ne estas solvita, sed se ni elektos la monton Saint-Hilaire, ni eĉ povus iri aŭtobuse. Kontaktu min je 522.4308.

## Aliaj aŭtunaj programeroj

- Vendredon 29-an de septembro : komuna vespermanĝo en la Montreala Esperanto-Domo.
- Mardon 15-an de novembro : restoracia vespermanĝo en *le Commensal*, Saint-Denis kaj Sherbrooke.
- Vendredon 15-an de decembro : komuna vespermanĝo en la Montreala Esperanto-Domo, okaze de la Zamenhofa festo.

Ĉiuj vespermanĝoj ekos je la 18 h 30. Tio ĉi estas la fundamenta programo. Ĉiuj membroj estas invitataj proponi kaj organizi mem aliajn eventojn : la estraro tiam helpas aranĝi la aferon kaj sciigos la aliajn membrojn pri tio.

**Por ĉiaj informoj, kontaktu la prezidanton de la Montreala Esperanto-Klubo, Sylvain Quirion ( Silko ), je 522.4308.**

Adreso de la Montreala Esperanto-Domo : 6358, rue de Bordeaux, metrostacio Beaubien.

Pour toute information sur les activités du club d'espéranto de Montréal et le programme ci-dessus, contacter son président, Sylvain Quirion, au 522.4308.

# La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia  
Aŭtuno de 1989. N-ro 16-a.

Ĉi-numere :

*Sala silko*

Jara raporto de E.S.K.

Baldaŭ ekparolos *la Papago*

Helpu al Jan Marek Kopytek

Amour, glasnost et espéranto

Rencontre automnale à Ottawa

Société québécoise d'espéranto  
C.P. 126, succ. « Beaubien »  
Montréal H2G 3C8